2.5 *Grundlegende Theoreme der lnformationstheorie*

2.50 *Ein Hilfssatz: Die Jensensche Ungleichung.*

Mehrere grundlegende Theoreme der Informationstheorie lassen sich bequem mittels der Jensenschen Ungleichung (Bild 2.50a) beweisen. Diese besagt, daß bei einer (in einem lntervall) konvexen Funktion $f(x)$ der gewichtete Mittelwert $\overline{f}(x)$ der Funktionswerte stets kleiner ist als der Funktionswert $f(\overline{x})$ des gewichteten Mittelwerts $\overline{x}$ der zugehörigen Argumentwerte x_i, sofern diese nicht alle übereinstimmen. Dabei heißt eine Funktion $f(x)$ in einem Intervall $]a, b[$ **konvex** (genauer: „von oben" konvex), wenn - anschaulich gesprochen - für zwei beliebige, verschiedene Punkte x_1, x_2 dieses Intervalls die Strecke zwischen den Kurvenpunkten $f(x_1)$ und $f(x_2)$ ganz unterhalb der Kurve liegt, welche $f(x)$ darstellt – selbstverständlich mit Ausnahme des Anfangs- und des Endpunkts dieser Strecke. Unter (möglichen) **Gewichten** eines gewichteten Mittelwerts $\overline{z}$ von u Zahlenwerten (oder Werten eines dimensionsbehafteten Skalars) z_i versteht man u positive Zahlen $g_i < 1$, deren Summe 1 ist (zum Beispiel die Wahrscheinlichkeiten, mit denen diese Werte in einem Feld zufällig erscheinen). Der **gewichtete Mittelwert** irgendwelcher u Werte z_i ist die Summe aller u Produkte $g_i z_i$ (im Beispiel also der Erwartungswert der Zufallsgröße z). Zusammenfassung:

2.5 *Bazaj teoremoj de la informaciteorio*

2.50 *Lemo: La malegalaĵo de Jensen.*

Pluraj bazaj teoremoj de la informaciteorio estas komforte pruveblaj helpe de la malegalaĵo de Jensen (bildo 2.50a). Ĉi tiu konstatas, ke ĉe funkcio $f(x)$ konveksa (en intervalo) la pezita mezvaloro $\overline{f}(x)$ estas senescepte malpli granda ol la funkcivaloro $f(\overline{x})$ de la pezita mezvaloro $\overline{x}$ de la koncernaj argumentvaloroj x_i, se ĉi tiuj ne ĉiuj koincidas. En ĉi tiu konteksto funkcio $f(x)$ nomitas **konveksa** (pli precize: „de supre“ konveksa) en la intervalo $]a, b[$, se - imagige parolante – por ajnaj du diversaj punktoj x_1, x_2 el ĉi tiu intervalo la streko inter la kurbopunktoj $f(x_1)$ kaj $f(x_2)$ situas komplete sub la kurbo bildiganta $f(x)$ – kun la escepto, kompreneble, de la komenca kaj la fina punktoj de ĉi tiu streko. Per (eblaj) **pezoj** de pezita mezvaloro $\overline{z}$ de u valoroj z_i de nombro (aŭ de dimensihava skalaro) oni komprenas u pozitivajn nombrojn $g_i < 1$, kiuj sumiĝas al 1 (ekz. la aperprobabloj de ĉi tiuj valoroj en kampo). La **pezita mezvaloro** (aŭ: pezita aritmo) de ajnaj u valoroj z_i estas la sumo de ĉiuj u produtoj $g_i z_i$ (en la ekzemplo do la ekspekto de la stokasta variablo z). Resumo:

(2.50.1) $$\sum_{i=1}^{u} g_i = 1$$

(2.50.2) $$\overline{z} := \sum_{i=1}^{u} g_i \cdot z_i$$

(2.50.3) $$\overline{f}(x) < f(\overline{x})$$



Bild 2.50a: *Die Jensensche Ungleichung im Spezialfall von nur u = 2 verschiedenen Argumentwerten gleichen Gewichts ($g_1 = g_2 = 1/2$)*

Bild 2.50a enthält das Schaubild einer Funktion, welche im Intervall]*a, b*[konvex ist[23]. Der gewichtete Mittelwert der u = 2 Werte x_1, und x_2 mit den Gewichten $g_1 = g_2 = 1/2$ ist natürlich der einfache arithmetische Mittelwert $\bar{x}$. Der Leser macht sich (z. B. unter Benutzung des Strahlensatzes) leicht klar. daß in diesem Spezialfall der gewichtete Mittelwert $\overline{f}(x)$ *der Funktionswerte* $f(x_1)$ und $f(x_2)$ gerade der Funktionswert der *Sehnenfunktion* an der Stelle $\bar{x}$ ist; er ist also sicher kleiner als der Funktionswert von $f(x)$ an derselben Stelle x. Dieser Satz läßt sich verallgemeinern auf *unterschiedliche* Gewichtszahlen und (z. B. durch vollständige Induktion) auf eine *beliebige* Anzahl $u \geq 2$ von Argumentwerten. In dieser Verallgemeinerung lautet ein Hilfssatz,

Bildo 2.50a: *La malegalaĵo de Jensen en la speciala kazo de nur u = 2 diversaj argumentvaloroj sampezaj ($g_1 = g_2 = ½$)*

La bildo 250a bildigas funkcion, kiu estas kompleksa en intervalo]*a, b*[[23]. La pezita mezvaloro de la u = 2 valoroj x_1 kaj x_2 kun la pezoj $g_1 = g_2 = 1/2$ estas kompreneble la simpla aritmo $\bar{x}$. La leganto evidentigas al si facile (ekz. uzante la raditeoremon), ke en ĉi tiu speciala kazo la pezita mezvaloro $\overline{f}(x)$ *de la funkcivaloroj* $f(x_1)$ kaj $f(x_2)$ estas ĝuste la funkcivaloro de la funkcio de la kordo je la punkto $\bar{x}$; ĝi do certe malsuperas la samlokan funkcivaloron de $f(x)$. Ĉi tiun teoremon eblas ĝeneraligi al *malsamaj* pezoj kaj (ekz. per matematika indukto) al *ajna* nombro $u \geq 2$ da argumentvaloroj. En ĉi tiu ĝeneraligo tekstas lemo, kiun ni uzos en la sekvantaj

[23]Diese Funktion ist ersichtlich sogar im links und rechts *geschlossenen* Intervall [*a, b*] konvex, d. h. es könnte z. B. auch $x_1 = a$ sein. Es ist aber für unsere Zwecke manchmal einfacher, vom beiderseitig *offenen* Intervall]*a, b*[auszugehen, zu welchem die Grenzpunkte *a* und *b* gerade nicht mehr gehören, so daß dort auch eine Unstetigkeit bestehen kann.

[23] Ĉi tiu funkcio evidente estas konveksa eĉ en la maldekstre kaj dekstre *fermita* intervalo [*a. b*], tiel ke povus validi ankaŭ $x_1 = a$. Sed por niaj celoj estas foje pli simple, argumenti per ambaŭflanke *malfermita* intervalo]*a, b*[, al kiu ĝuste la limpunktoj *a* kaj *b* ne plu apartenas, ebligante tiean malkontinuecon.

auf den wir in folgenden Kapiteln mehrere Beweise stützen werden: **Wenn**
(a) $f(x)$ in einem Intervall $]a, b[$ konvex ist,
(b) $x_i \in]a, b[$ für alle $i \leq u$, wobei $u \geq 2$,
(c) $x_i \neq x_j$ für mindestens ein Indexpaar i, j (falls also nicht alle Argumentwerte zusammenfallen) und
(d) für $u \geq 2$ positive Zahlen g_i die Gleichung (2.50.1) gilt,
***dann** gilt die Jensensche Ungleichung:*

ĉapitroj por pluraj pruvoj, jene: **Se**
(a) $f(x)$ estas konveksa en intervalo $]a, b[$,
(b) $x_i \in]a, b[$ por ĉiuj $i \leq u$, kun $u \geq 2$,
(c) $x_i \neq x_j$ por almenaŭ unu paro da indicoj i, j (se do ne ĉiuj argumentvaloroj koincidas) kaj
(d) por $u \geq 2$ pozitivaj nombroj g_i validas la egalaĵo (2.50.1),
***tiam** validas la malegalaĵo de Jensen:*

(2.50.4) $$\bar{f}(x) := \sum_{i=1}^{u} g_i \cdot f(x_i) < f(\sum_{i=1}^{u} g_i \cdot x_i) =: f(\bar{x})$$

2.51 *Maximale Unsicherheit H, Knappheit und Redundanz.*

2.51 *Maksimuma necerteco H, koncizeco kaj redund*

In Kapitel 2.3 wurde der Selbstbeobachtung entnommen und an einigen Beispielen verdeutlicht, dass unser Gefühl der Unsicherheit bei gleichem Feldumfang desto schwächer wird, je stärker die einzelnen Wahrscheinlichkeiten voneinander abweichen. Mit der Jensenschen Ungleichung können wir nun umgekehrt mathematisch beweisen, dass - bei konstantem Feldumfang $u(Z)$ - das Unsicherheitsmaß H sein Maximum im Falle der Gleichwahrscheinlichkeit annimmt. Für $u(Z) = 2$ (Bild 2.3a) wurde dies in Kapitel 2.3 schon auf schulmathematische Weise bewiesen. Zu beweisen ist noch der allgemeine

Satz: Die Unsicherheit H in einem Feld Z, dessen $u = u(Z) \geq 2$ Elemente nicht alle die gleiche Wahrscheinlichkeit[24] haben, ist

En la ĉapitro 2.3 estis ekkonate el la memobservado kaj ilustrite per kelkaj ekzemploj, ke nia sento de malcerteco kaze de egalampleksaj kampoj des pli malfortiĝas, ju pli diferencas inter si la unuopaj probabloj. Per la malegalaĵo de Jensen ni nun povas inverse matematike pruvi, ke – kaze de konstanta amplekso $u(Z)$ – la mezuro H de la malcerteco atingas sian maksimumon kaze de egalprobableco. Por $u(Z) = 2$ (bildo 2.3a) tio estis jam pruvata laŭ lernejmatematika maniero en ĉapitro 2.3. Pruvenda estas ankoraŭ la ĝenerala

Teoremo: La malcerteco H en kampo Z, kies $u = u(Z) \geq 2$ elementoj ne ĉiuj samprobablas[24], estas

(2.51.1) $$H/\text{bit}^{25} < \text{ld } u$$

[24] Hier und bei allen folgenden Anwendungen der Jensenschen Ungleichung kann man alle Elemente der Wahrscheinlichkeit 0 aus dem Feld zuvor schon streichen. Das setzen wir beim Beweis als geschehen voraus. Der Satz gilt aber *a fortiori* auch für das ursprüngliche, umfangreichere Feld!

[24] Ĉi tie kaj ĉe ĉiuj sekvaj aplikoj de la malegalaĵo de Jensen eblas jam anticipe forstreki el la kampo ĉiujn elementojn kun probablo 0. Ni supozas dum la pruvo ke tio jam okazis. Des pli la teoremo validas por la origina, pli ampleksa kampo!

Sie ist kleiner als die im Falle der Gleichwahrscheinlichkeit (d.h. für $p_i \equiv 1/u$) bestehende maximale Unsicherheit

Ĝi estas malpli granda ol la maksimuma necerteco reganta kaze de egalprobableco (t.e. por $p_i \equiv 1/u$)

(2.51.2) $$H_{\max}/\text{bit} = \text{ld}\, u$$

Beweis:

Wegen $p_i > 0$ und $u \geq 2$ liegen die Wahrscheinlichkeiten p_i alle in]0; 1[, erfüllen also die Bedingung (d) für Gewichtszahlen in der Jensensche Ungleichung: $g_i \equiv p_i$. Ferner ist die Funktion *ld x* im Intervall]1; ∞[konvex, erfüllt dort also die Bedingung (a) für eine Funktion in der Jensenschen Ungleichung: $f(x) \equiv \text{ld}\, x$. Schließlich sind die Unwahrscheinlichkeiten $1/p_i$ nicht alle gleich, und sie liegen im Konvexitätsintervall; sie können daher gemäß (*b, c*) als Argumentwerte x_i in die Jensensche Ungleichung eingesetzt werden: $x_i \equiv 1/p_i$. Mit diesen Einsetzungen wird aus (2.50.4) speziell:

Pruvo:

Pro $p_i > 0$ kaj $u \geq 2$ la probabloj p_i situas ĉiuj en]0; 1[. Ili do plenumas la kondiĉon (d) por roli kiel pezoj en la malegalaĵo de Jensen: $g_i \equiv p_i$. Krome la funkcio ld x estas konveksa en]1; ∞[. Ĝi do tie plenumas la kondiĉon (a) por roli kiel funkcio en la malegalaĵo de Jenssen: $f(x) \equiv \text{ld}\, x$. Fine la malprobabloj $1/p_i$ ne ĉiuj egalas, kaj ili situas en la konveksecintervalo; do laŭ (*b, c*) eblas ilin enmeti kiel argumentvalorojn en la malegalaĵon de Jensen: $x_i \equiv 1/p_i$. Per ĉi tiuj substitucioj (2.50.4) specialiĝas al:

(2.51.3) $$\sum_{i=1}^{u} p_i \cdot \text{ld}\frac{1}{p_i} < \text{ld}\Big(\sum_{i=1}^{u} p_i \cdot \frac{1}{p_i}\Big) = \text{ld}\Big(\sum_{i=1}^{u} 1\Big) = \text{ld}\, u$$

Die linke Seite dieser Ungleichung ist nach Gleichung (2.19.3) die Unsicherheit H/bit. Auf der rechten Seite ist die Summe von u Summanden zu bilden, die alle gleich 1 sind; diese Summe ist also gleich u, so daß rechts *ld u* steht. Damit ist (2.51.1) für alle $u \geq 2$ bewiesen.

Im Falle der Gleichwahrscheinlichkeit haben alle u Möglichkeiten des Feldes dieselbe Wahrscheinlichkeit, nämlich $1/u$, und damit dieselbe Information, nämlich ld u. Setzt man diese speziellen Werte in Gleichung (2.19.3) ein, dann erhält man u gleiche Summanden, folglich die Summe ld u als Unsicherheit bei dieser bisher ausgenommenen Wahrscheinlichkeitsverteilung.

La maldekstra flanko de ĉi tiu malegalaĵo estas laŭ (2.19.3) la necerteco H/bit. Je la dekstra flanko adiciendas u adiciatoj, kiuj ĉiuj egalas al 1; ĉi tiu sumo do estas u, tiel ke dekstre staras ld u. (2.51.1) tiel estas pruvita por ĉiuj $u \geq 2$.

En la kazo de egalprobableco ĉiuj u ebloj de la kampo havas la saman probablon, nome $1/u$, sekve la saman informacion, nome ld u. Se oni enmetas ĉi tiun specialan valoron en la egalaĵon (2.19.3), ĉiuj adiciatoj egalas. Kiel necertecon en ĉi tiu ĝis nun ekskludita probablodistribuo oni do ricevas la sumon ld u. Pro tio, ke krome ĉi valo-

[25] Statt der strengen Schreibweise „H/bit < ld u" - ld u ist eine bloße Zahl, während H nach unserer Konvention die Pseudomaßeinheit „bit" tragt - ist es meist blich, einfacher „H < ld u" zu schreiben, oder - besser - „H < log u".

[25] Anstataŭ rigore skribi „H/bit < ld u" – ld u estas nura nombro, sed H havas laŭ nia konvencio la pseŭdomezurunuon „bit" – oni kutimas skribi pli simple „H < ld u" - aŭ, pli bone - „H < log u".

Da dieser Wert von H im übrigen - nach der für alle anderen Verteilungen schon bewiesenen Ungleichung (2.51.1) - größer ist als H für die anderen Verteilungen, ist er das Maximum von H. Damit ist auch (2.51.2) bewiesen.

Durch Kombination der Beziehungen (2.51.1) und (2.51.2) erhält man die (weniger aussagekräftige) allgemeine Beziehung

ro de H - pro la malegalaĵo (2.51.1), pruvita jam por ĉiuj aliaj distribuoj – estas pli granda ol H por la aliaj distribuoj, ĝi estas la maksimumo de H. Tiel pruviĝis ankaŭ (2.51.2).

Per kombino de la rilatoj (2.51.1) kaj (2.51.2) oni ricevas la (malpli informigan) ĝeneralan rilaton

$$H/\text{bit} \leq \text{ld } u \tag{2.51.3}$$

Eine Nachrichtenquelle möge wiederholt Zeichen aus dem endlichen, konstanten Feld Z (Umfang: $u(Z) =: u$) liefern. Die jeweilige Information ist dabei eine Zufallsgröße. Ihr Erwartungswert ist nach Gleichung (2.19.3) gerade $H(Z) =: H$. Es ist, wie bei jeder Zufallsgröße, nach dem in Abschnitt 2.19 zu den Gleichung (2.19.1) und (2.19.2) Gesagten zu erwarten, daß die *durchschnittliche* Information der Zeichen bei wachsender Länge N der Folge gegen den Erwartungswert strebt, also im Falle der Zufallsgröße „Information des gesendeten Zeichens" gegen H, daß also die *Folge insgesamt* eine Information der Größenordnung $N{*}H$ enthält.

Ist diese Information kleiner als $N{*}\text{ld } u$ bit, dann heißt die Nachrichtenquelle bzw. die von ihr gelieferte Zeichenfolge „redundant", deutsch: „weitschweifig".

Diese Bezeichnung ist treffend, denn mit N Zeichen hätte die Quelle nach (2.51.2) die Information $N{*}\text{ld } u$ bit liefern können, hätte sie nur alle Zeichen gleichwahrscheinlich gesendet. Sie hat also, umgangssprachlich formuliert, „zu wenig mit zuviel Worten" gesagt (wenn das Zeichenrepertoire aus Wörtern besteht). Anders ausgedrückt: eine *nicht* redundante Quelle hätte zur Lieferung der Information NH *weniger* als N Zeichen gebraucht, nämlich N^*, die aber alle $H_{max} = \text{ld } u$ bit Information enthalten hätten.

Es ist also $N^*{*}\text{ld } u \textit{ bit} = N{*}H$.

Der Bruchteil, auf welchen die Zeichen-

Mesaĝfonto havigu ripete signojn el la finia, konstanta kampo Z (amplekso: $u(Z) =: u$). Ilia informacio en la unuopa kazo estas stokasta valoro. Ĝia ekspektvaloro estas laŭ egalaĵo (2.19.3) ĝuste $H(Z) =: H$. Kiel ĉe ĉiu stokasta valoro laŭ la konstataĵoj faritaj pri (2.19.1) kaj (2.19.2) en ĉapitreto 2.18 estas ekspekteble, ke la *aritma* infomarcio de la signoj por kreskanta longeco N de la sinsekvo konverĝas al la ekspektvaloro, do kaze de la stokasta variablo „informacio de la sendita signo" al H, do ke la *sinsekvo entute* enhavas proksimume la informacion $N{*}H$.

Se ĉi tiu informacio malsuperas $N{*}\text{ld } u$ bit, tiam la informfonto resp. la de ĝi sendita signovico nomitas „redunda" (malkonciza).

Ĉi tiu nomo estas trafa, ĉar per N signoj la fonto povintus havigi laŭ (2.51.2) la informacion $N{*}\text{ ld } u$ bit, se ĝi nur estus sendinta ĉiujn signojn samprobable. Per ĉiutaga parolturno esprimite: la fonto diris „tro malmulton per tro multaj vortoj" (se la signorepertuaro konsistas el vortoj). Alie esprimite: *ne* redunta fonto povintus liveri la informacion NH per *malpli* ol N signoj, nome per N^*, de kiuj tamen ĉiuj enhavintus $H_{maks} = \text{ld } u$ bit da informacio.

Do $N^*{*}\text{ld } u \textit{ bit} = N{*}H$.

La ono, al kiu signovico ŝrumpus,

folge zusammenschrumpfen würde, wenn auf Weitschweifigkeit verzichtet würde, ist nach dieser Gleichung

se estus rezignite pri malkoncizeco, laŭ ĉi tiu egalaĵo estas

$$k := \frac{N^*}{N} = \frac{H\ /\ \mathrm{bit}}{\mathrm{ld}\ u} \qquad (2.51.5)$$

Dieser Bruchteil heißt zurecht „Knappheit“. Ist nämlich für eine Zeichenfolge k *klein*, dann entält schon eine erheblich kürzere andere, redundanzfreie Zeichenfolge gleich viel Information[26] wie die betrachtete, so dass diese wenig knapp, vielmehr sehr weitschweifig (redundant) ist. Die höchste Knappheit $k = 1$ wird erreicht, wenn $N^* = N$ ist, also gleichviel Information nicht mit einer kürzeren Folge lieferbar ist.

Ĉi tiu ono nomitas trafe „koncizeco“. Ĉar se k de signovico *malgrandas*, tiam malpli longa, alia, neredunda signovico enhavus la saman kvanton da informacio[26] kiel la konsiderata, tiel ke ĉi tiu ne tre koncizas sed malkoncizas (redundas). La maksimuma koncizeco $k = 1$ estas atingita, se $N^* = N$, se do sammulton da informacio ne havigeblas per malpli longa vico.

Der Bruchteil oder Prozentsatz, der bei knappest möglicher Informationpackung eingespart werden könnte, heißt „relative Redundanz".

La ono aŭ procentaĵo, kiun eblus ŝpari, se oni plejeble koncizigas la ensignigadon de la informacio, nomitas „relativa redundo“.

$$r := 1 - k = 1 - \frac{H\ /\ \mathrm{bit}}{\mathrm{ld}\ u} = \frac{\mathrm{ld}\ u - H\ /\ \mathrm{bit}}{\mathrm{ld}\ u} \qquad (2.51.6)$$

Als „absolute Redundanz" wird der Ausdruck

„Absoluta redundo“ nomitas la esprimo

$$R := \mathrm{ld}\ u\ \mathrm{bit} - H \qquad (2.51.7)$$

bezeichnet, also der Fehlbetrag der Unsicherheit gegenüber der maximalen Unsicherheit.

do la manko de la necerteco ĝis la maksimuma necerteco.

In den beiden nächsten Kapiteln werden wir erkennen, daß eine stochastische Abhängigkeit in der Aufeinanderfolge der Zeichen einer Folge deren Redundanz stets vergrößert.

En la du sekvantaj ĉapitroj ni ekkonos, ke stokastika dependeco, laŭ kiu la signoj sin sekvas, ĉiam plialtigas la redundon de la sinsekvo.

[26] Damit ist *noch nicht* gesagt, dass es sich um die selbe *Information (Nachricht)* handeln könnte. Man kann ja auch die mit einem Aluminiumwürfel gelieferte Masse mit einem wesentlich kleineren Goldwürfel liefern (weil die spezifische Dichte von Gold größer ist), aber die Materie der beiden Liefe-rungen ist verschieden. Da aber (im Unterschied zur Materie) ein Zeichen nicht *„ist“* sondern *„zeigt“,* enthält die redundanzfreie und daher kür-zere Zeichenfolge tatsächlich nicht nur (quanti-ta-tiv) *gleich viel* Information wie die längere, sondern kann (bei passender Umkodierung) auch *qualitativ die selbe* Information liefern. Dies wird in Teil III bewiesen.

[26] Per tio *ankoraŭ ne* estas dirite, ke povus temi pri la *sama informo*. Oni ja povas an-kaŭ la mason, liveritan per kubo el alumi-nio, liveri per konsiderinde malpli granda kubo el oro (ĉar la specifa denseco de oro estas pli granda), sed la materio de la du liveroj malegalas. Sed pro tio, ke (alie ol materio) signo ne *„estas“* sed *„montras“*, la ne redunda kaj tial malpli longa signosin-sekvo fakte enhavas ne nur (laŭkvante) *sammulton* da informacio kiel la pli longa, sed povas (se ĝi estas taŭge alikodita) liveri ankaŭ *laŭkvalite la saman* informon. Tio estos pruvata en parto III.

2.52 *Superierungsredundanz*

Dieselbe, von einer Quelle gesendete Signalfolge kann, wie gegen Ende des Kapitels 2.18 erläutert, den Empfang unterschiedlicher Zeichenfolgen bewirken, je nachdem, wie der Empfänger gerade superiert, also in Abhängigkeit von seinem Zustand. Man kann z.B. Buchstabenfolgen oder (komplexbildend) Wortfolgen lesen. Beim Lesen einer in unterschiedlichen Schrifttypen gedruckten Folge von Buchstaben kann man von den Typen (klassenbildend) abstrahieren. Zwei Empfänger können daher dieselbe Signalfolge auf zwei verschiedenen Stufen einer Superzeichenhierarchie apperzipieren. Durch klassenbildendes Superieren verliert eine Folge an „unwesentlicher“ Information. (Man superiert klassenbildend ja gerade durch Abstraktion von dem zum jeweiligen Zwecke Unwesentlichen!). Auch bei komplexbildendem Superieren kann man dies vermuten.

In Anlehnung[27] an eine Begriffsbildung von Felix von Cube (1965, S. 115) bezeichnen wir als „*Superierungsredundanz*" den Ausdruck

2.52 *Prosuperumadredundo*

La sama, de fonto sendita signalsinsekvo povas, kiel klarigite fine de la ĉapitro 2.18, kaŭzi la ricevon de diversaj signo-sinsekvoj, depende de tio, kiel la ricevanto aktuale superumas, do depende de lia stato. Oni povas legi ekz. litersinsekvojn aŭ (kompleksige) vortsinsekvojn. Legante litersinsekvon presitan per diversaj litertipoj one povas de la tipoj (klasige) abstrakti. Du diversaj ricevantoj do povas apercepti la saman signalsinsekvon sur du diversaj ŝtupoj de hierarkio de „supersignoj“ (= kunsignoj). Per klasiga superumo la sinsekvo perdas „ne esencan“ informon. (Oni ja superumas klasige per abstrakto de tio, kio ne estas esenca por la aktuala celo!) Oni povas konjekti tion ankaŭ ĉe la kompleksiga superumado.

Apogante[27] nin al nocikreaĵo de Felix von Cube (1965, p 115) ni no mas „*prosuperumadredundo*“ la esprimon

$$r_s := 1 - I_s/I \qquad (2.52.1)$$

in welchem I die Gesamtinformtion einer Zeichenfolge (z.B. Buchstabenfolge) ist, I_s die Gesamtinformation derselben gesendeten Nachricht, die aber der Empfänger als Superzeichenfolge (z.B. als Folge ganzer Wörter) „apperzipiert“ (d.h. bewusst wahrnimmt).

en kiu I signifas la tutan informacion de signosinsekvo (ekz. de litersinsekvo), I_s la tutan informacion de la sama, sendita mesaĝo, sed „apercep-tita“ (t.e. enkonsciigita) de la ricevonto kiel sinsekvon de supersignoj (ekz. de vortoj).

[27] Das durch F. von Cube eingeführte Maß der „Superzeichenredundanz“ weicht von der Definitionsgleichung (2.52.1) der Superierungsredundanz etwas ab. Erstens führt es F. von Cube nur für den Fall komplexbildender Superierung ein, während (2.52.1) auch bei Klassenbildung gilt. Zweitens stimmt v.Cubes Maß auch in diesem Spezialfall nur näherungsweise mit dem hier definierten Maß r_s überein. Mit diesem dürfte aber v.Cubes Grundgedanke verallgemeinert und präzisiert sein.

[27] La mezuro de „supersigna redundo“ enkondukita de F. von Cube iom devias de la prosuperumadredundo difinita per (2.52.1). Unue F. von Cube ĝin enkondukas nur por la kazo de kompleksiga superumado, dum kiam (2.52.1) validas ankaŭ por klasigo. Due ankaŭ en ĉi tiu spe-ciala kazo la mezuro de v.Cube nur proksimume koincidas kun la ĉi tie difinita mezuro r_s. Sed ĉi tiu supozeble ĝeneraligas kaj plipreciziĝas la bazan ideon de v.Cube.

Die Fruchtbarkeit dieser Begriffsbildung besteht darin, dass sie erstmals einen Zusammenhang zwischen bloß statistischen Größen und der Kategorie des *Nutzens* herstellt Die *Richtung* der Superierung - und damit die Superzeichenredundanz! - hängt ja vom *Zweck* der lnformationsaufnahme ab.

Die Superierungsredundanz im eben definierten Sinne darf nicht verwechselt werden mit der Redundanz der auf einer Superzeichenstufe apperzipierten Folge. Beispielsweise möge eine Quelle mit gleicher Wahrscheinlichkeit und unabhängig vom jeweiligen Vorgänger die vier Fragewörter und die entsprechenden vier Zeigewörter von ILo für Individuen (KIU, TIU), Klassen (KIO, TIO), Eigenschaften (KIA, TIA) und Orte (KIE, TIE) liefern, so dass z.B. in einer N_1 = 80 Textwörter langen Folge jedes dieser 8 Wortschatzwörter 10 Mal auftritt. Der Informationsgehalt der Folge beträgt also $I_1=80 \cdot \mathrm{ld}\ 8$ bit=240 bit. Interessiert man sich nur dafür, ob das jeweils nächste Wort fragt oder zeigt, superiert man also klassenbildend zu den nur zwei Superzeichen {K..} und {T...}, dann apperzipiert man auf dieser Superzeichenstufe eine gleichlange Zeichenfolge, jedoch mit dem auf $I_2=80 \cdot \mathrm{ld}\ 2$ bit = 80 bit gesunkenen Informationsgehalt. Nach der Definitionsgleichung (2.52.1) berechnet man als Superierungsredundanz r_s = 2/3. Da aber die u = 2 verschiedenen Superzeichen mit gleicher Wahrscheinlichkeit aufeinanderfolgen, ist die Unsicherheit auf dieser Betrachtungsstufe H =1 bit, also die Redundanz nach Definitionsgleichung (2.51.6) r = 0 (wie auch bei *Beachtung der Verschiedenheit* der u = 8 Wörter auf der darunter liegenden Stufe, auf welcher die Unsicherheit über das jeweils nächste Wort H = ld 8 bit = 3 bit beträgt).

Auf die Stufe der *Wörter* gelangt man komplexbildend von der Stufe der *Schriftzeichen* aus: jedes der 8 Wörter besteht aus 3

La starigo de ĉi tiu nocio estas fruktodona, ĉar ĝi la unuan fojon interrilatigas nure statistikajn valorojn kun la kategorio de la *utileco.* La *direkto* de la superumado - kaj per ĝi la prosuperumada redundo! - ja dependas de la *celo* de la informenpreno.

La prosuperumadredundo en la ĵus difinita senco ne estu konfuzata kun la redundo de sinsekvo aperceptata sur ŝtupo de supersignoj. Ekzemple liveru fonto samprobable kaj stokaste sendepende la kvar ILajn demandvortojn kaj la korespondajn kvar montro-vortojn por individuoj (KIU, TIU), klasoj (KIO, TIO), kvalitoj (KIA, TIA) kaj lokoj (KIE, TIE), tiel ke en ekz. N_1 = 80 tekstvortojn longa sinsekvo ĉi tiuj 8 vorttrezoraj vortoj aperas po 10-foje. La informacio de la sinsekvo do estas $I_1=80 \cdot \mathrm{ld}\ 8$ bit = =240 bit. Se oni interesiĝadas nur, ĉu la sekvanta vorto demandas aŭ montras, se oni do superumadas klasige al la nur du supersignoj {K...} kaj {T...}, tiam oni aperceptadas sur ĉi tiu supersigna ŝtupo samlongan signosinsekvon, sed kun informacio malpligrandigita al I_2 = $80 \cdot \mathrm{ld}\ 2$ bit = =80 bit. Laŭ la difina egalaĵo (2.52.1) oni trovas kiel prosuperumadredundanco r_s = 2/3. Sed ĉar la u = 2 diversaj supersignoj sinsekvas samprobable, la necerteco sur ĉi tiu aperceptadŝtupo estas H = 1 bit, do la redundo laŭ la difinegalaĵo (2.51.6) r = 0 (same kiel kaze de *atentado de la diverseco* de la u = 8 vortoj sur la senpere suba ŝtupo, sur kiu la necerteco pri la sekvanta vorto estas H = ld 8 bit = 3 bit).

La ŝtupon de la *vortoj* oni atingas kompleksige de la ŝtupo de la *skribsignoj*: ĉiu de la 8 vortoj konsistas el 3

Buchstaben, gefolgt von einem Zwischenraum. Statt N_1=80 Wortzeichen ist also dieselbe, von der Quelle gelieferte Nachricht N_0=320 Schriftzeichen lang. Von ihnen sind I und der Wortzwischenraum die häufigsten: ihre Auftrittswahrscheinlichkeit ist je (80/320 =)¼. K und T treten je mit der Wahrscheinlichkeit 1/8 auf, und die vier Schlussvokale an je 20 Stellen der Schriftzeichenfolge - sie haben je die Auftrittswahrscheinlichkeit 1/16. Durch Addition der Informationsbeiträge oder durch Anwendung der Definitionsgleichung (1.2.3) berechnet man als Informationsgehalt der 320 Schriftzeichen $I_0=N_0H_0=320 \cdot 2{,}75$ bit=880 bit. Ihre Redundanz ist 1–2,75/3=1/12= =0,083..., ihre Knappheit 11/12. Kehrt man zurück zur Superzeichenstufe der Wortzeichen, also zu den nur 240 bit, dann „erlebt" man eine Superierungsredundanz von 1–240/880=8/11=0,7272... (eine Superierungsverknappung auf 3/11). Um rund 73% (auf 3/11) sinkt also die Information (die Unvorhersehbarkeit), sobald man die Nachricht nicht mehr als stochastisch unabhängige Folge von Schreibmaschinenanschlägen sondern als stochastisch unabhängige Wortfolge ansieht (d.h. so apperzipiert).

Dass dieser Wert erheblich größer ist als die berechnete Redundanz der Schriftzeichenfolge (nur 8,3... %), beruht offensichtlich auf der starken Abhängigkeit, mit welcher diese Zeichen aufeinanderfolgen: auf K und T folgt *immer* I, auf U, O, A und E folgt *immer* der Zwischenraum. Diese beiden Zeichen haben also hier die Wahrscheinlichkeit 1 und damit die Information 0. Entsprechend ist die bedingte Wahrscheinlichkeit von U, O, A und E nach I je ¼ (bedingte Information: 2 bit), von K und T nach dem Zwischenraum je ½ (1 bit Information). Zählt man die insgesamt 320 Informationswerte der je 80 Zwischenräume und Buchstaben I (0 bit), der je 40 Zei-

